


**Dum sia vojaĝo en Eŭropo, Onia el Koreio haltis en Svislando.
Post ŝia vizito en CDELI, Stefano Keller intervjuis ŝin.**



Sonregistraĵo (mp3) de la intervjuo:  <http://goo.gl/h4Sn3z>

S.- Saluton Onia! Ĉu vi rakontus al ni pri via aventuro, kiel ĝi komenciĝis kaj kiel vi atingis Svislandon vojaĝante per Esperanto?

O.- Saluton! Onia estas mia esperanta nomo, mia vera korea nomo estas Kim Onnuri. Jam antaŭ mi mia patrino komencis lerni Esperanton en 2009. Poste ŝi prezentis la lingvon al mi kaj mi komencis lerni ĝin.

S.- Ĉu vi eklernis Esperanton tute sola, ĉu kun via patrino aŭ per libro?

O.- Mi lernis Esperanton sub gvido de mia instruisto [Lee Jungkee](#).

S.- Do, vi lernis kun mia UEA-estrara kolego – mi gratulas lin kaj vin. Mi vidas ke ‘naskiĝas’ multaj novaj esperantistoj en Koreio.



O.- Jes, jes!

S.- Kaj kiel okazis poste, ĉu vi havis kontaktojn kun esperantistoj, kiam vi jam parolis ĝin?

O.- Mi povis havi kelkajn kontaktojn per Facebook kaj per Skajpo, kiujn mi uzis por kontakti eksterlandajn esperantistojn. Kaj en julio 2013 mi partoprenis en la Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis en Islando...

S.- ...jes, kaj tie mi vidis vin la unuan fojon, kiam en la Oratora Konkurso vi partoprenis, kiel unua kandidato.



O.- Jes, mi partoprenis tie ankaŭ la konkurson.

S.- *Jam de kelkaj monatoj vi survojas, ĉu ne?*

O.- Post la UK mi preskaŭ jam du monatojn vojaĝis en Eŭropo.

S.- *Kiujn landojn vi vizitis?*

O.- Post la Universala Kongreso mi partoprenis en SAT-kongreso, kiu okazis en Madrido, Hispanio. Poste mi partoprenis en esperanta teatra evento de la fama esperanta kastelo Greziljono.

S.- *En la diversaj landoj kaj urboj kie vi loĝis ? Ĉu en hoteloj aŭ vi havis kontaktojn personajn?*

O.- En Greziljono mi pagis por la loĝado en la loĝejo de la Kulturdomo. En aliaj lokoj mi ĉiam restadis ĉe diversaj esperantistoj. En la SAT-kongreso la esperantisto Manuel gastigis min dum ok tagoj.

S.- *Vi vizitis ankaŭ la Centran Oficejon de UEA. Ĉu post tio vi venis rekte al Svislando ?*

O.- Post Rotterdamo mi iris al Italio kaj nur poste mi venis ĉi tien, Svislanden.

S.- *Jes, kaj ni ĝuste venas el CDELI, kie vi vizitis la arkivejon sub la gvido de S-ro Claude Gacond, kiu mem kreis tiun centron antaŭ pli ol kvindek jaroj. Ĉu post tiu ĉi vizito vi ankoraŭ restos kelkajn tagojn en Svislando?*

Onia kun



*Claude kaj Andrée [GACOND](#)
en [CDELI](#), Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia
Biblioteko de la Urbo, [La Chaux-de-Fonds](#), Svislando*

O.- Jes, mi restados kelkajn tagojn, sed ne scias ekzakte kiom da.

S.- *Do, vi havas liberan programon kaj povas decidi laŭ la ebloj, kiel vi volas.*

O.- Jes.

S.- *Ĉu estis facile organize vian vojaĝon, la gastigadojn kontaktante esperantistojn en la mondo laŭ viaj planitaj vizitoj?*

O.- Jes, mi vizitis sep landojn en Eŭropo kaj restadis en dek hejmoj, mi renkontis dek gastigantojn.

S.- *Ĉu ili estis esperantistoj?*

O.- Jes, kompreneble.

S.- *Tio estas vera internacia interkonatiĝo kaj interamikiĝo.*

O.- Jes, vere.

S.- *Kio estus via mesaĝo al Koreiaj gejunuloj, kiuj volus lerni fremdan lingvon?*

O.- Ĉu en la korea lingvo?

S.- *Jes, diru tion en la korea, kaj tiel ni povos aŭdigi ĝin al ili.*

O.- 안녕하세요. [한국](#)에 계신 학생 여러분. 한국에서는 많은 분들에 영어나 중국어, 일본어 또는 프랑스어등을 중점으로 외국어 공부를 많이 하시는데요. 어느 나라에도 속해있지 않고 평등한 인공어 에스페란토 라는 언어가 존재합니다.

Saluton! En [Koreio](#) multaj gestudentoj lernas la anglan, japanan, ĉinan aŭ francan lingvon. Estas tre bona tamen ankaŭ alia lingvo, kiu estas neŭtrala kaj apartenas al neniu popolo. Ĝi estas Esperanto.

에스페란토는 쉽고 평등한 언어입니다. 전 세계 에스페란토 사용자들은 서로를 항상 돕습니다.

Esperanto estas facila kaj kreas egalecan rilaton inter diversaj popoloj. Kaj esperantistoj ĉiam helpas unu al la alia.

저는 세달 동안 유럽을 여행중입니다. 지금까지 에스페란토를 사용하는 열 가정에서 저를 재워주시고 먹여주시고 도와주셨습니다. 이 뿐만 아니라 여행에서 만난 모든 에스페란토 친구들이 저의 여행을 항상 도와주었습니다.

Mi vojaĝas tra Eŭropo dum tri monatoj. Ĝis nun dek esperantistoj gastigis min. Ankaŭ aliaj esperantaj amikoj ĉiam helpis mian vojaĝon.

자 이렇듯 에스페란토는 전 세계에서 지금 이순간에도 쓰이고 있습니다. 저는 여러분께 충분히 살아있는 그리고 유용한 언어 에스페란토를 배우실 것을 적극 추천합니다. 들어주셔서 감사합니다.

Esperanto estas parolata en la tuta mondo, en multaj landoj. Mi rekomendas al vi lerni ĉi tiun vivantan kaj utilan lingvon!

S.- Dankon Onia por tiu interparolado kaj mi esperas, ke la aŭskultantoj ne koleros pro la fona bruo, ni ja konversacias en iu kafejo de la urbo La Chaux-de-Fonds (Ĉaŭdefono), en Svislando. Ĝis reaŭdo!

O.- Dankon! Ĝis reaŭdo!



www.cdeli.org | www.lernu.net | www.esperanto.co.kr | www.uea.org

Tiu ĉi PDF en la retejo de CDELI: <http://goo.gl/zKSlt0>